

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

Kasisto : Jean COLOMBEL, La Payennière, 8 impasse des Maraichers. 76 290 MONTIVILLIERS

Redakcio : Yves NICOLAS, 14 place Laënnec. 14000 CAEN. Tel. 02.31.95.11.81 ivnicolas@sfr.fr

Raporto pri la Ĝenerala Asembleo Hérouville, la 20an de septembro.

Nia Ĝenerala Asembleo estis ĉi-jare aparta evento ĉar samtempe ankaŭ okazis inaŭguro de « **Esperanto** » skvaro en Hérouville Saint Clair kie la loka klubo festis per diversaj manifestacioj dum unu monato sian tridekjariĝon.

Ĉeestis kvardeko da samideanoj venintaj de niaj normandaj departementoj sed ankaŭ de La Ciotat, Korea Respubliko, Rusio kaj Japanio. **Ana Sonĝanta** (Shin Eun-Sook), bela kaj vigla junulino, brile prelegis pri sia sperto kiel instruistino de la internacia lingvo en korea alternativa lernejo. Per interesaj komentitaj fotoj kaj lertaj respondoj al tre multaj demandoj de la publiko, ŝi klarigis kiel ŝi enkondukis esperanton por jam ne ŝablona instrumentado kaj kiel ŝi uzas modernajn komunikilojn (ekz. Skajpon) por rilatigi siajn lernantojn kun eksterlandaj klasoj kiuj ankaŭ lernas esperanton. Ŝia prelego havis grandan sukceson ĉar ĝi estis lingve kaj teme kvazaŭ perfekta.

Poste, **Mikaelo Bronŝtejn**, tre konata bardo kaj verkisto en esperantujo, kaj **Vera Vlasova**, muzikinstruistino, ambaŭ el Tiĥvin, ĝemela urbo de Hérouville, kantigis la anaron sub dolĉa ombro de bela arbo.

Fine de la posttagmezo, okazis la inaŭguro de la Skvaro kun intervenoj de **Renée Triolle**, kiel delegito de Universala Esperanto Asocio ĉe Unesko, de **Sylvie Lepoitevin vic-urbestrino de Hérouville** kaj de **Gérard Sénécal** prezidanto de la loka klubo.

Ĉeestis tiun simpatian inaŭguron proksimume 60 homoj kiuj kune kantis kun niaj rusaj amikoj la kantojn matene lernitajn. Konkludis la tagon minikoncerto de Mikaelo kaj Vera kaj poste bankedo kun 36 kunmangantoj.



Kaj nun la Ĝenerala Asembleo mem :

28 homoj ĉeestis kaj partoprenis tiun gravan ĝeneralan asembleon. Kial grava ? Ĉar Petro Kijo (sekretario) kaj Petro Lemarchand (kasisto kaj redaktoro de nia bulteno) jam anoncis sian demision el la estraro. Kiel kaj ĉu plu funkcios nia asocio, jen la ĉefaj demandoj kiun ni pritraktis dum du plenplenaj horoj.

Enkonduke, **Yves Nicolas** memorigis, ke nia normanda asocio celas krei kaj vivi ligojn inter la kluboj kaj la individuoj. Ĝi faciligas la interklubajn rilatojn, subtenas la klubojn kaj reklamas esperanton.

Nia asocio havas fortajn flankojn : monhava kaso, regule kaj belaspekte aperanta bulteno, grupoj en 4 el la 5 departementoj.

De tri jaroj, la Ĝenerala Asembleo regule okazas kun elstaraj invititoj (polo en 2012, japanoj en 2013, koreano kaj rusoj en 2014).

Sed, bedaŭrinde, ankaŭ ekzistas malfortaj flankoj : la estraro neniam kunvenas, .../...

En tiu numero :

Ĝenerala Kunveno	1 - 2
Estrara kunsido	3
Intensa staĝo	3
MUDIE Harold	4
www.edukado.net	4 - 5
Kotizoj Abonoj 2015 Paruzio	6

AGRABLAJN FESTO-TAGOJN ! por ĉiuj !



Paĝo 2a

.../...

la bulteno estas la sola ligilo inter du ĝeneralaj asembleoj kaj tre malmultaj homoj sendas artikolojn al la redaktanto. Okazas kursoj en Le Havre, Sud-Manche, Flers kaj Hérouville sed plej multaj kluboj (krom Hérouville) konsistas el malmulte da membroj.

Petro Lemarchand per tre precizaj lumbildoj prezentas la buĝetan situacion. Ĝi estas relative komforta sed la kotizoj de la aliĝantoj estas entute uzataj por la eldono de la bulteno kaj la poŝta sendokosto cetere pli kaj pli altiĝonta.

Petro atentigas nin, ke li demisias pro diversaj kialoj : neniu estrara kunveno, neniu aktualigo de la administra flanko, tre malmultaj artikoloj proponitaj de la lokaj grupoj por la bulteno. Li opinias nian regionan asocion artefarita vivanta strukturo.

Petro Kijo ankaŭ demisias sed ĉefe pro sia aĝo post multjaraj klopodoj por la esperanto movado.

Estu granda danko pro la rimarkinda laboro de Petro Lemarchand kaj Petro Kijo sed ankaŭ de **Petro Pottier** kaj **Petro Jouvin**, tre agemaj esperantistoj kiuj ne povis ĉeesti nian kunvenon.

Post raporto de la lokaj kluboj pri sia loka vivo, la ĉeestantaro devis renovigi trionon el la estraro kaj ĉefe trovi anstantaŭantojn de Petro Lemarchand kaj Petro Kijo (ankaŭ demisiis Petro Jouvin, pro maljuniĝo, kiel kontrololisto sed li ne estis estrarano). Kandidatoj ne multis, memkompreneble ! Tamen, **Sylvie Caron** el Le Havre bonvolis eniri la estraron kiu nun estas jena : **Christian Levesque** (Sud-Manche), **Anne-Marie Leprévost** (Orne), **Jean Colombel** kaj **Sylvie Caron** (Seine-Maritime), **Barthélémy Maurau** (Eure), **Gérard Sénécal** kaj **Yves Nicolas** (Calvados).

Tiu nova estraro, kun Petro Lemarchand kaj Petro Kijo kunvenos en Hérouville Saint Clair la 11an de novembro por decidi pri estonteco de nia asocio. La estraranoj taksos tion kio estos farebla kaj konsekvence reorganigos la postenojn.


Por konkludi tiun kunvenon, ĉiuj partoprenantoj esprimis siajn dezirojn por la asocio : **firmigi la interklubajn ligojn per temaj vizitoj, vojaĝoj, konferencoj, staĝoj, turneoj, instruado en novaj urboj, ktp.**

Ne mankas la ideoj kiuj postulas de ĉiuj konkretan partoprenon !

Yves Nicolas



Ana SONGANTA
(SHIN EUN-SOOK)



Mikaelo BRONŝTEJN



Gérard SENECAI prezidanto de la Hérouville-Grupo kaj
niaj eksterlandaj geamikoj el Japanio, Rusio, Koreio,
Renée TRIOLLE delegito de U.E.A. ĉe UNESKO kaj
Yves NICOLAS prezidanto de Esperanto Normandie.



La vic-urbestrino de Hérouville inaŭguras la skvaron.

Conseil d'Administration du 11 nov. 2014.

Présence de : (14) Yves NICOLAS, Gérard SENEAL, (61) Anne-Marie LEPREVOST, (76) Jean COLOMBEL, Pierre LEMARCHAND.

Absence de : (27) Barthélémy MAURAU, (50) Christian LEVESQUE, (76) Sylvie CARON.

« **HERITAGE** » : P. Lemarchand, démissionnaire du C.A. à l'Assemblée Générale du 20/09/2014. en même temps que P. Quillaud et P. Jouvin, après un riche et long travail pour notre association, a transmis les archives de l'Union des Espérantistes de Normandie, de la Fédération Normande des Centres Culturels E°, et de leur fusion en 2005, notre actuelle E° Normandie, à Y. NICOLAS.

P. Lemarchand a commenté certains des documents : les **livres officiels** (tenus par P. Quillaud), les **cahiers des Comptes** (Mrs Jouis, Quillaud, Lemarchand) et derniers comptes d'exploitation vérifiés par P. Jouvin. (Frais bancaires actuels élevés depuis 2013), les **listes d'adhérents** et leurs fiches individuelles., **Normanda E° Bulteno** : collection d'anciens n°s, le procédé d'étiquetage pour les envois postaux. (augmentation des timbres prévue au 1/1/2015, le format actuel pour ne pas dépasser 20 gr.). **2 C.D.**, ainsi que le **contenu d'une clef USB** ont été transmis pour notre nouveau trésorier, ainsi que le contenu d'une conférence de 45 minutes en français pour présenter l'Espéranto.

Y. Nicolas a montré des photos anciennes sur des espérantistes normands à identifier.

ACTUALITE et PERSPECTIVES :

Lecture des courriers de B. Maurau (nouveau délégué pour les cotisations de SAT pour la France), il accepterait le poste de trésorier d'E° Normandie. et de C. Lévesque vers une meilleure communication sur l'accueil des invités espérantistes, sur des excursions régionales ou des visites en groupe à l'étranger, sur de futurs stages.

Bureau élu : **Président** : (pour 1 an) : Yves NICOLAS, **Trésorier** : Jean COLOMBEL, **Secrétaire** : Anne-Marie LEPREVOST, **Rédacteur du bulletin** : Yves NICOLAS.

Nouvelle adresse de l'Association :

Jean Colombel, 8 impasse des Maraîchers, 76290 MONTIVILLIERS.

Contact avec la Préfecture (76) et courrier : Y. Nicolas et J. Colombel.

Bulletin : Y. Nicolas et le groupe d'Hérouville, parution en 3 numéros (janvier, mai, octobre).

Sollicitation régulière des différents groupes E° de la région pour articles et nouvelles rubriques.

Eventualité de différencier les « adhésion-abonnement », selon les versions « papier » ou « courriel », à discuter à la prochaine A.G. (augmentation des tarifs postaux et tirage papier).

Banque : étudier et comparer les frais bancaires de gestion, pour « association de proximité » proposés par La Banque Postale, le Crédit Coopératif ... jusqu'en décembre (Jean Colombel), avant les changements d'adresse et de liste des signataires de chèques... En attendant le dernier chéquier est transmis à Y. Nicolas.

Conseil d'Administration : recontacter Odile ou Philippe BONY (50 - Coutances) pour étoffer le groupe (voire le féminiser, évocation de l'A.G. du 20 sept. 2014). Prochain rendez-vous : samedi 7 ou 14 février 2015, chez J. Colombel.

Anne-Marie LEPREVOST



La 18an kaj 19an de oktobro, partoprenis en la staĝo organizita de la asocio Herouville Esperanto dudek ok personoj kiuj venis de la departementoj Eure, Orne, Manche, Calvados kaj Indre-et-Loire.

Ok staĝantoj, veraj aŭ ne veraj komencantoj, sekvis la kurson de la Slovakoj **Stano Marček**, fame konata aŭtoro de la "Rekta Metodo". Gigi, kiu instruas la komencantojn en la sino de la heruvila klubo, ĉeestis por observi kiamaniere uzi tiun metodon.

La dudek aliaj, staĝantoj kaj organizantoj, sekvis la kurson de la Franco **Michel Dechy**. Tiu ĉi ankaŭ uzis sian propran lernolibron kies titolo estas "La bildstrioj kiel lernolibroj". La herooj de Herge, precipe Tinĉjo, Miluo kaj Kapitano Hadok', dum du tagoj longe restis la subjektoj de la interveno de **Michel Dechy**.

Tuja bilano de la staĝo rivelis, ke la du gvidantoj ĝenerale kontentigis, eĉ ege kontentigis la plimulton de la partoprenantoj. La lokoj je nia dispono, la surlokaj manĝoj kaj la agrabla etoso ankaŭ ricevis la aprobon de la majoritato. Ankaŭ tre kontentigis la ĉeestantaron la kantoj gviditaj de Stano Marček, post la kursoj kiuj postulis intensan atenton de ĉiu.

Tamen, se estonte okazos alia staĝo, la organizantoj devos provi respondi kelkajn dezirojn. Aldoni interan nivelon inter la komencantoj kaj la progresantoj, provi pli paroligi inter si la samgrupanojn, plani vegeterajn manĝojn estas la ĉefaj sugestoj.

Gérard SENEAL

MUDIE Harold Bolingbroke

Londres 30 Juin 1880

- Forges-les-Eaux 6 Janvier 1916

Capitaine de l'Armée Royale Britannique

Décédé à l'âge de 35 ans

Sur sa tombe :

**« FILANTROPO PREZIDANTO DE BRITA KAJ
UNIVERSALA ASOCIOJ DE ESPERANTO »**

Harold Mudie est né à Londres le 30 Juin 1880.

Enfant unique, il fit ses études à l'Université de Londres et vivait avec ses parents Alfred et Anne Mudie à Londres - Kensington Gardens.

Avant 1914, il a travaillé en tant que Trader au London Stock Exchange.

Au début de la Première Guerre mondiale, il rejoint le Corps de l'Armée Britannique et est affecté au Centre de Remonte Central à Forges-Les-Eaux à partir du 10 Octobre 1914.

Le 6 Janvier 1916, il décède en service commandé dans un accident de voiture.

Il est décoré de l'Étoile de 1914, de la Médaille de Guerre Britannique et de la Médaille de la Victoire.

Espérantiste britannique, il apprit l'espéranto en 1902.

En Novembre 1903, il fonde le journal

« L'espérantiste ».

Ce journal devient rentable en Janvier 1906 et s'associe à « L'espérantiste britannique ».

Il était un fervent partisan pour publier le Nouveau Testament en espéranto et était un défenseur de la promotion de l'espéranto dans d'autres pays; il en visita plusieurs lors des Congrès Universels d'Espéranto.

En 1908, il devient Président de l' Association Mondiale d'Espéranto nouvellement fondée et a été membre de la Lingva Komitato , précurseur de l'Académie de l'Espéranto.

Il a été président de l'Association d'espéranto de la Grande-Bretagne de 1912 à 1916 .


Il est enterré au cimetière communal de FORGES - LES-EAUX (76). L'inscription sur sa pierre tombale est en espéranto.

<http://herosdeforgesleseaux.free.fr/M/MUDIE%20Harod%20Bolingbroke.htm>

<http://herosdeforgesleseaux.free.fr/>



**Teksto + fotoj eltiritaj de « esperanto-aktiv-nº48
Découverte, junio 2014. » ESPERANTO-FRANCE.**



un site pour apprendre et enseigner l'espéranto

1) Bonjour, Katalin Kovats, pouvez-vous vous présenter en quelques mots ?

Je m'appelle donc Katalin Kovats, linguiste, professeur de russe, d'italien et d'espéranto. Je suis aussi spécialiste en méthodologie et j'ai pendant des années formé de jeunes professeurs de langues. Ma propre thèse de doctorat avait pour thème : La valeur propédeutique de l'espéranto.

2) Vous vous occupez actuellement du site edukado.net, pouvez-vous nous dire comment est né ce site ?

J'ai créé le site www.edukado.net en 2001 dans le but de soutenir les personnes enseignant l'espéranto de par le monde, en leur fournissant des informations détaillées sur le matériel d'enseignement existant, livres, disques, jeux, etc. Bien vite, j'ai commencé à mettre également à leur disposition du matériel prêt à l'usage, produit par edukado.net. Dès le début, une fondation américaine, ESF, a soutenu le projet en finançant la première version du site et le travail de son rédacteur jusqu'à aujourd'hui. Il est intéressant de souligner aussi que lorsque, il y a quelques années, une refonte totale du site s'est montrée nécessaire, ce sont les usagers eux-mêmes qui ont rassemblé les 35 000 € nécessaires. Cela montre que ce site est important pour ses utilisateurs.

3) Que peut-on trouver sur edukado.net ?

Pour ne nommer que les choses les plus importantes : j'ai déjà parlé du catalogue des divers matériels d'enseignement disponibles sur le marché. C'est la rubrique [Katalogo] qui décrit 500 ouvrages. S'y ajoutent les 800 exercices et activités prêts à l'usage sous [Instrumaterialoj]. Le site soutient de plus l'organisation de cours de par le monde en annonçant ceux-ci dans la rubrique [Kursejo] tandis qu'enseignants et apprenants peuvent échanger sur le [Forumo], se tenir au courant en cliquant sur [Novaĵoj] ou trouver des correspondants en utilisant le [Koresponda servo]. Tous ces services sont gratuits.

À part ça, notre site devient un important gardien de l'histoire de l'enseignement de notre langue en collectionnant les documents s'y rapportant – [Dokumentejo] et [Filmejo] – et en honorant les grands pédagogues espérantistes dans son [Panteono]. Enfin, une activité essentielle du site est l'organisation des examens de langue selon le prestigieux système européen CECR : à ce jour, 1500 diplômés de 60 pays différents.

4) Aujourd'hui, qui sont les visiteurs du site ?

3500 espérantistes venant de 123 pays sont aujourd'hui inscrits à www.edukado.net.

Les Français y sont le plus grand groupe avec plus de 500 membres. La plupart des visiteurs utilisent les services du site mais environ une centaine y collaborent plus ou moins régulièrement en fournissant du matériel et des informations, menant des groupes de discussion ou même se chargeant de projets précis.

5) Quelles sont les nouveautés du site et vos projets futurs ?

Ces derniers mois, c'est sans aucun doute le jeu en ligne RISKO – sur la culture, le mouvement et la langue espérantistes – qui remporte le plus de succès. Plus de 150 joueurs frénétiques y sont devenus complètement accros et enrichissent leurs connaissances en s'amusant.

Pour améliorer la qualité du contenu, nous avons créé cette année un système de « crayon rouge » qui permet aux utilisateurs de signaler les erreurs qu'ils y découvrent, ou de rajouter de l'information supplémentaire.

Un grand pas en avant vient aussi d'être accompli avec l'automatisation de la préparation des sessions mondiales des examens CECR, automatisation qui permet de gérer la réalisation d'une trentaine de sessions simultanément. La troisième journée mondiale des examens a été planifiée pour le 17 mai de cette année avec plus de 170 candidats (17 centres dans 12 pays, de la Colombie au Japon). Pour augmenter le prestige de notre langue, nous avons aussi mis en ligne une liste où les diplômés CECR peuvent se faire connaître et montrer qu'ils sont fiers à juste titre de leur réussite.

À plus long terme, nous voudrions créer un système d'évaluation en ligne du niveau de connaissances linguistique, mais cela demande de rassembler d'abord des collaborateurs et des moyens que nous n'avons pas encore à disposition.

6) Comment peut-on aider au développement d'edukado.net ?

C'est très simple : tout d'abord en faisant connaître le site à tous les utilisateurs potentiels, à tous ceux à qui il pourrait être utile. Ensuite, en y prenant part de façon active en y communiquant conseils, appréciations et critiques, en s'y exprimant et en contribuant par du matériel ou de l'aide pratique. Et enfin bien sûr en soutenant financièrement notre travail, et, si possible, régulièrement. Même les plus petites sommes nous sont précieuses car elles montrent que edukado.net est vraiment ce qu'il veut être : un précieux lieu d'échanges et de formation active pour tous ceux qui participent à l'apprentissage de notre langue.

PARUZIO

(Porinfana rakonto ?)

Okazis ĉe la mezo de la kvara erao :
Kuniklido ploradis en la subtera truo,
ĉar de jam pluraj tagoj li malsatis kaj timis.
La elirinta panjo, al domo ne revenis.

Por li kompatindulo, tempo estis veninta
Paŝi ekster la antro, ĝis tiam prohibita.
Li devis mem malkovri la nutrigajn herbeojn
Kapablajn surogati de la panjo la mamojn.

ĉe rando de la truo, li prezentis la nazon,
Longege observadis la mirigan eksteron,
Kaj fine subĉiele riskis kelkajn paŝetojn,
Atendis, kaj lanĉiĝis, en la aventurojn.

ĉio estis kvieta, agrabla suno varmis,
Dolĉa vento blovdadis, verda herbo invitis.
Li do faras dek paŝojn, kaj kvindek, kaj perdiĝas,
Retrovi sian hejmon li neniel kapablas.

Denove li ploradis, kiam rufa bestego
De vosto volumena, de maldika muzelo,
Al li sin direktiĝis kaj kies lango ruĝa
Klare estis signalo de celo malfavora.

Estis forta vulpino havanta tri vulpidojn,
Kiu metro sub tero atendis freŝajn karnojn.
La eta kuniklido, sub dentoj senkompataj
Iris al destinaĉo neniel evitebla.

SED SUBITE ĈIELO FORTEGE EKLUMIĜAS,
KAJ LA RUFU VULPINO PRO TIO TUJ HALTIĜAS.
ENVOLVIGAS LA TERON BELA MUZIKO DOLĈA
KAJ APERAS JESUO MEZE DE GLORO SIA.

Finfin' estis veninta la tago promesita
De la oldaj profetoj, pri Naturo perfekta,
Tago de Paruzio elektita de Dio
Por sendi sian filon regadi sur la tero.

ĉio en mondo ĝojas, la demono forfuĝas,
Malamo malaperas kaj la doloroj ĉesas ;
En la batal' por vivo, ĉiu proksimulo
Ne plu estas predaĵo aŭ konkurencanto.

La kompleta kreaĵo ekkantas "halelujo" !
De la plej eta herbo ĝis plej alta sekojo.
Karotoj kaj kunikloj, subite amikegoj,
Dancas kun la leonoj, la bidoj, kaj formikoj.

Manao el ĉielo abundege ekfalis,
El kiu sen mortigi, ĉiu elĉerpi povis.
La vulpino da ĝi plenigis grandan korbon
Por siaj geidetoj, fastintaj tiun tagon.

Ŝi eĉ faris pli bone, kun si ŝi prenis l'orfon,
Kaj ja lin instaligis en sian varman antron.
Tiel li konatiĝis kun la tri geidetoj,
Kun ili petoladis, ek de tiam amikoj.

Kaj plenkore ludintaj, ridintaj kaj manĝintaj,
En paco ili dormis, la kvin buliĝintaj.
La morgaŭon matene la vulpa familio
Revenigis la orfon antaŭ sia truo,
Kie resurektita, la panjo kuniklino
Ilin vidante spertis la imageblan ĝojon.

Henri ROUSSEAU Mathieu la 23an de oktobro 2014

Kotizoj - Abonoj por 2015 :

SAT-AMIKARO : 132/134 Boulevard Vincent Auriol 75013
Paris. Tel. : 01.44.24.50.48.

www.sat-amikaro.org

CCP. : 37.852.90.L 033 La Source.

Cotisation + abonnement à « La Sago » : 35,00 €

Abonnement simple «La Sago» sans adhésion 32,00 €

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda : 67 avenue Gambetta.
75020 Paris. Tel. : 01.47.97.71.90.

www.satesperanto.org

Cotisation à SAT + abonnement à « Sennaciulo »

(11 n°s) : 52,00 €

Maurrau Barthélémy, appartement 120, 3 allée Nathalie
Sarraute, 27000 Evreux. barthelemy.maurrau@free.fr

CCP. : SAT-PERANTO : 17.333.10.N. Paris.

Esperanto France 4 bis rue de la Cerisaie 75014 Paris

Tel. : 01.42.786.886. www.esperanto-france.org

Cotisation : (chômeurs : 15 €) 39,00 €

Abonnement au « Monde de l'Esperanto » : 18,00 €

• **Universala Esperanto Asocio** :

Cotisation : (avec Jarlibro) 26,00 €

Cotisation, tarif réduit : (sans Jarlibro) 11,00 €

Cotisation avec abonnement à la

revue « Esperanto » : 64,00 €

• **Esperanto-Jeunes** :

Cotisation « Espéranto-Jeunes »

+« Espéranto-France » : 30,00 €

d° - pour étudiants, chômeurs : 15,00 €

• **TEJO : (Association mondiale des Jeunes)** :

Cotisation + abonnement à « Kontakto » : 26,00 €

- d° - + abonnement à la revue « Esperanto » 64,00 €

Esperanto-INFO : Les Bories de Coperliac.

Mas de Saint Chély. 48210 Sainte Enimie.

Tel. : 04.66.48.58.48

CCP. : n°11.901.46.B 029 Marseille.

Abonnement + Adhésion: (6 n°s) : 20,00 €

Dorénavant : nous vous prions, pour vos règlements concernant vos cotisations-abonnements (**8,00 €**) et vos dons, de libeller vos chèques à l'ordre de : « **ESPERANTO-NORMANDIE** » et de les envoyer à notre nouveau trésorier **Jean COLOMBEL, 8 impasse des Maraîchers 76290 MONTIVILLIERS.**

De même, vos articles, photos, documents sont à envoyer à notre rédacteur : **Yves NICOLAS, 14 place Laënnec 14000 CAEN. Tél. : 02.31.95.11.81; ivnicolas@sfr.fr**

Un grand merci à toutes celles et ceux qui m'ont encouragé par leur envoi de documents pour la rédaction de notre modeste bulletin, ainsi que pour leurs dons pour notre association et leurs divers messages de soutien. Bon courage à la nouvelle équipe du Conseil d'Administration. Bien amicalement, Pierre Lemarchand.